Por la estimataj partoprenantoj de la

# VIIIa internacia Esperanto Kongreso
en Krakovo, Austrio, 1912.


## Nord-Bohema

# Piano kaj Orkestrionfabriko

## (A. k. l. g.) Georgswalde (Austrio)

## Mignonpiano „Favorito“

Specimenrajto (26,276)



Farata el Ebenito Nuksligno aŭ Mahagonio. Kruckorda kun firma ferkadro, arte origita, fera agordtrabo, speciala sonorilo. Eburklavaro. Bonega ripetmekaniko kiu ebligas facilan, elastan ludadon, donante noblan kantriĉan sonoron.

**Honorindaj Samideanoj!** Okaze de la nunjara grava Jubilea kongreso Vi estu ĝentile atentigata al nia bonkonata firmo. En nia fabriko estas farataj ĉiuspecaj pianoj, pianenoj kaj orkestrionoj kun ruloj aŭ notoj. Uzante riĉajn spertojn ni fieras fabrikadi kaj vendi nur (bonvolu turni)

# Salon-Pianeno

Modelo **A.**



Nuksligna aŭ polisandra. Sepoktava eburklavaro. Ferkadro kun firma agordtrabo unupece. Duoblekrucigitaj kordoj. Laŭ deziro kun moderatoro. La ornamaĵoj ĉiamaniere kaj koloro estas farataj. Plej supera ripetmekaniko.

vere bonkvalitajn, arte ellaboritajn instrumentojn. — En niaj laborejoj troviĝas la plej novaj laŭspertaj maŝinoj per kiuj laboras aro da lertaj specialistoj. Ni uzas elpruvitajn metodojn kaj proprajn patentojn, ekz. duoblekrucigitaj kordoj, specialaj resoniloj k. a. — La estimataj samideanoj estas en nia fabriko

# Piano-Orkestrilo „Ariono“



La ŝranko kverkligna, verda, blanka, aŭ marmorigata, kun artaj manpentraĵoj kaj speguloj.

Senbrua elektra aŭ pezilmovado.

Arte aranĝita violonmuziko, kun ruloj aŭ divers specaj notoj laŭ deziro.

Por grandaj salonoj aŭ ĉambregoj. Sonriĉa, ĉiela muziko.

ĉiam kore bonvenaj kaj povas rigardi la laborejojn ne devigate aĉeti. Ĉiuflanke ni estas pretaj subteni la Esperantan movadon kaj ĉiu aĉetanta Esperantisto ricevos pli malaltan prezon de kiu ankaŭ nia Esperantisto grupo ricevadas rabaton por la propagando de nia kara **Esperanto.**

# Dankleteroj.

Haida, Bohemio, Junio 1912.

Estimata firmo!

Feliĉa mi estas posedante Vian senditan pianenon kaj estas mia unua devo Vin danki por ĝia perfekta, arta kaj belega ellaborado. Laŭ la juĝo de niaj muzikeminentuloj Stahr, Niesig, Ullrich, k. a. oni trovas en Via instrumento ĉion kunigita kion povas deziri vera muzikartisto kaj mi estas fiera posedi en nia urbo la unuan vere laŭdindegan instrumenton de Via firmo. Pliaj mendoj jam estas certaj.

Sincere Via

**Ernst Schowald.**

---

Ampass, 18. IV. 12.

Tre estiminda Firmo!

Mi sciigas Vin ke, pri la pianeno, sendita de Vi, mi estas plene kontentigata, ĉar ĝi respondas al ĉiuj deziroj, kiujn oni povas havi je perfecta pianeno.

Aĉetinte ĉe Vinur private mi ja ne havos ofte bezonon de pianoj, tamen mi ne forgesos rekomendi Vin inter miaj konatuloj laŭpove.

Altestime kun kora saluto

**Otto Anker,** instruisto.

---

Niemes, 1. V. 12.

Nordbohema Pianofabriko, Georgswalde.

La mendita „Patria"-Flugil-Piano kun angla mekaniko alvenis en plej bona stato kaj superas ĉiuflanke miajn, vere grandajn, postulojn.

La instrumento plenumas ĉiujn dezirojn fareblajn al konzertpiano perfektega.

Agrable surprizata mi estas pri la mirinda, forta, samtempe mola, kantema sonado; plie pri la facila elasta klavaro, kiu ebligas ĉian ajn dezireblan ludmanieron.

La belegan eksteraĵon ankaŭ estas vera ĝojo ĝin vidi.

Akceptu mian plej bonan dankon kun la certigo ke mi ne forgesos rekomendi Viajn instrumentojn inter ĉiuj miaj konatuloj laŭeble.

Kun granda altestimo subskribas Via

**Artur Franz,** kantoro kaj musikinstruisto.

---

Tre estiminda Firmo!

Sufiĉe elpruvinte la de Vi senditan „Patria" Pianon, estas mia ĝojo Vin sciigi ke mi estas tute kontenta pri la belega instrumento.

Precipe mi laŭdas la ludeblecon; la ludanto estas en la agrabla stato ludi mirinde malforte tamen belsonorante, aliaflanke laŭtege, tamen ne malmole sonorante.

Ke tiuj ĉefaĵoj de bona piano kunigitaj estu kun bone egaligita sonado estas ja kompreneble. Plie estas rimarkindaj la belega eksteraĵo kaj la laŭcela, firma ellaboro de la „Patria" Piano.

Finante mi deziras al Via fabriko la plej bonan sukceson kaj laŭpove mi kunhelpos per plej forta rekomendado.

Niederdorf, Tirolo, Junio 1912.

Altestimplene

**Florian Hochkofler,** lernejestro kaj muzikestro.

---

Nordbohema Pianofabriko, Georgswalde.

Kun plej bona danko mi ricevis la, de Vi senditan, kruckordan „Mignon"-Pianon.

La instrumento havas multe da preferindaĵoj, kiel forta plena sonoro, distinginda, plej nova, angla mekaniko, la moderatoro, plie la eleganta firma ellaboro, la tamen ne tro alta prezo, vere, tion oni ne trovas ofte kunigitaj kaj mi estis tre agrable surprizata.

La supre dirito sufiĉe atestas la superecon de Viaj pianoj kaj via firmo estu plej bone kaj ĉie recomendata.

Subskribas altestime kaj sindonege

Prof. **M. v. Ambros**, muzikartisto kaj direktoro de la muziklernejo, Wien XIX.

8. Februaro 1912.

Juĝe certigata.

J. C. F. Pickenhahn & Sohn, Chemnitz.